

Kiamaniere Kristo Organizis Sian Eklezion?

Mallonga studo pri la restarigo de la Eklezio de Jesuo Kristo

Antaŭ ol li organizis sian Eklezion, Jesuo instruis multajn principojn de la Evangelio. Interalie, li konigis la gravecon esti baptita per sia propra bapto sub la manoj de Johano la Baptisto. Li instruis, ke ĉiu homo devas esti baptita por ricevi la pardonon de pekoj kaj donis la ekzemplon per sia enakviĝo en la Jordanrivero.

La Eklezio de Jesuo Kristo kaj la Evangelio instruita de la Sinjoro inkluzivas multajn trajtojn kaj ritojn, kiuj karakterizas ĝin kiel la originala kristana eklezio; multe pli ol tio, kio estas pritraktita ĉi tie. Tamen, la trajtoj de la Eklezio estas laŭbiblie veraj kaj bazaj. Tiuj ĉi kredoj, doktrinoj kaj praktikoj devas daŭri en la Eklezio, ĝuste kiel Paŭlo diris al la Efesanoj "... ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon de la fido." Unu el la signoj kaj bazaj kristanaj kredoj, ke Jesuo estas fakte la Kristo okazis post lia krucumado. Lia spirito reunuiĝis al lia korpo. Li senmetafore releviĝis kaj montris sin al siaj apostoloj.

La Eklezio, kiun organizis Jesuo Kristo enhavis precizajn aliajn elementojn kaj praktikojn, kiel vidante sube. (Se via Biblio estas ĉemane, bonvolu malfermi ĝin kaj studi la jenajn versojn dum vi daŭrigas la legadon de ĉi tiu artikolo.)

Vivantaj Apostoloj

Efesanoj 4:11-12

Vivantaj Kristanaj Profetoj

Efesanoj 4:11-12

La Sepdekoj

Luko 10:1

Vokata de Dio "kiel Aaron"

Hebreoj 5:4

Laika Klerikaro

Mateo 10:8

Bapto per enakvigo

Mateo 3:16

Daŭra Revelacio

Amos 3:7

Donacoj de la Sankta Spirito

Marko 16:16-18

Aldonaj Sanktaj Skriboj

Jehezkel 37:16-17

Bapto por la mortintoj

I Korintanoj 15:29

Evangelio predikata al la mortintoj

I Peter 3:18-19

Membroj nomitaj Sanktuloj

Efesanoj 2;19

La Sakramento

Luko 22:19-20

Kredo je fizika releviĝo

Luko 24:39

Kredo je la Dieco de Jesuo Kristo

Johano 14:6

Kredo je persona Dio

Hebreoj 1:1-3

La Eklezio de Jesuo Kristo estis konstruita sur la fundamento de Apostoloj kaj Profetoj kun Jesuo Kristo mem kiel la ĉefa bazangula ŝtono. Lia Eklezio ankaŭ enhavis la relative nekonatan oficon de la Sepdekoj, kiuj respondecis pri la disvastigado de la Evangelio en la tuta mondo per misia agado. La Savinto parolis pri persona Dio, ja sia propra Ĉiela Patro, je kies senmetafora bildo la homo estis kreata. Samtempe, li atestis pri sia propra dieco. Li estis la ununura naskita filo, laŭkorpe de Dio, la Eterna Patro.

La Perdo kaj Apostateco

Iom post iom la originala eklezio fondita de Jesuo Kristo perdiĝis. La apostoloj kaj profetoj estis mortigitaj. La perdo kaj apostateco de la Eklezio, kiun Kristo organizis, estis antaŭdirita.

Amos: "Jen venos tagoj, diras la Sinjoro, la Eternulo, kaj mi sendos malsaton en la landon, ne malsaton pri pano kaj ne soifon pri akvo, sed soifon por aŭskultado de la vortoj de la Eternulo." (Amos 8:11)

Paŭlo: "... ĉar nepre antaŭe (antaŭ la reveno de Kristo) okazos la apostateco ..." (II Tesalonikoj 2:3).

La plenumo de tiuj ĉi apostataj profetaĵoj okazis proksimume je la jenaj datoj.

Vivantaj Apostoloj

Neniu konata post 110 p.K.

Vivantaj Kristanaj Profetoj

Nekonataj post la unua jarcento

Kredo je persona Dio

Doktrino ŝanĝita antaŭ 320 p.K.

Kredo je la Dieco de Jesuo Kristo

Doktrino ŝanĝita antaŭ 200 p.K.

Vokata de Dio "kiel Aaron"
 Nekonata post la unua jarcento
Laika Klerikaro
 Ŝanĝita antaŭ la kvara jarcento
Donacoj de la Sankta Spirito
 Nekonataj post Konstanteno
Membroj nomitaj Sanktuloj
 Ĉesigita post la unua jarcento
Daŭra Revelacio
 Ĉesis post la unua jarcento
Aldonaj Sanktaj Skriboj
 Nekonataj post la unua jarcento
Bapto per enakvigo
 Surŝprucigado komenciĝis dum la dua jarcento
Evangelio predikata al la mortintoj
 Perdita post la epoko de la Nova Testamento
Bapto por la mortintoj
 Perdita post la unua jarcento
La Sakramento
 Ŝanĝita post Konstanteno

La Restarigo de la Evangelio kaj Eklezio de Jesuo Kristo

Dio diris, ke Li ne ŝanĝiĝas; Li estas sama hieraŭ, hodiaŭ kaj ĉiam. Ankaŭ lia evangelio ne ŝanĝiĝas. Liaj postuloj por atingi savon estas la samaj nuntempe kiel dum la tagoj de la apostoloj. Sekve, lia eklezio devas enhavi la samajn organizadon, doktrinon kaj Dian aŭtoritaton. La Sanktuloj de la Lastaj Tagoj anoncas, ke Dio konatiĝis al mortemuloj en tiuj ĉi modernaj tempoj kaj restarigis sian Eklezion precize kiel ĝi estis antikve. En la jaro 1820, la kredo de persona Dio estis restaŭrita kiel ĝi estis antikve, per persona vizito de la Eternulo al elektita servanto. Jozefo Smith ricevis tian viziton. Li diris: "Mi vidis du homfigurojn, kies lumeco kaj gloro defias ĉian priskribon, starantaj super mi en la aero. Unu el ili parolis al mi, vokante min per mia nomo kaj diris, fingromontrante al la alia, 'Tiu ĉi estas Mia Amata Filo. Aŭdu lin!'"

Per la finfina apero, post multaj jarcentoj, de Dio la Patro kaj lia filo Jesuo Kristo, la restarigo de la vera evangelio komenciĝis. Dum periodo de multaj jaroj, Jozefo Smith daŭre ricevadis revelaciojn kaj instrukciojn rilate al la organizado de la Eklezio, kiun Jesuo starigis, kiam li estis surtere. Ĉielaj mesaĝantoj el la ĉeesto de Dio donis al Jozefo Smith kaj aliaj la aŭtoritaton por ke ili agu je la nomo de Dio. La ofico de la Sankta Apostoleco venis al Jozefo Smith kaj al Olivero Kaŭderi per la manoj de Petro, Jakobo kaj Johano, apostoloj de la antikveco. Johano la Baptisto donis la aŭtoritaton por administri la ĝustan bapton. Multe da aliaj mesaĝantoj alvenis kaj donis al Jozefo Smith la povon realigi la mision, kiun Dio donis al li. Tiel, la Eklezio de Jesuo Kristo estis restarigita en tiuj ĉi lastaj tagoj, kune kun la

aŭtoritato kaj Dia povo por validigi liajn ritojn.

La Voĉo de Profetaĵo

La Eklezio, kiun Kristo organizis estas restarigita, kiel estis antaŭdirite.

Jesaja: "En tiu tempo la Sinjoro denove etendos Sian manon, por akiri la restaĵon de Sia popolo ..." Jesaja 11:11.

Johano la Revelaciisto: "Kaj mi vidis alian anĝelon, flugantan en meza ĉielo, havantan eternan evangelion, por evangeliigi la loĝantojn de la tero." Apokalipso 14:6.

Jesuo: "Kaj Li responde diris: Vere Elija venos antaŭ kaj restarigos ĉion." (Mateo 17:11).

Ĉi-sube troviĝas la precizaj jaroj, kiam ĉiuj organizaĵojn kaj ritoj de la Eklezio de Jesuo Kristo estis restarigitaj en sia perfekteco laŭ la plenumoj de tiuj ĉi profetaĵoj.

Vivantaj Apostoloj	1829
Vivantaj Kristanaj Profetoj	1839
Kredo je persona Dio	1820
Kredo je la Dieco de Kristo	1820
Vokata de Dio "kiel Aaron"	1829
Laika Klerikaro	1829
Donacoj de la Sankta Spirito	1830
Membroj nomitaj Sanktuloj	1830
Daŭra Revelacio	1820
Aldonaj Sanktaj Skriboj	1823
Bapto per enakvigo	1829
Evangelio predikata la la mortintoj	1829
Bapto por la mortintoj	1840
La Sakramento	1830

Kiam oni zorge prikonsideras la signojn kaj trajtojn, kiuj ekzistis en la Eklezio fondita de Jesuo kaj serĉas similan Eklezion surtere hodiaŭ, enhavanta la samajn ritojn, principojn, kredojn kaj instruojn, ne estas malfacile rekoni ĝin.